

Vikidatumoj (Wikidata)

Ni ĉiuj konas la Vikipedion (Wikipedia), la interretan enciklopedion. Ĝi estis fondita en la jaro 2001, do antaŭ 20 jaroj.

Bedaŭrinde la amaso da artikoloj nur malfacile estas aŭtomate traserĉebla. Ekzemple, se vi volas scii, kiom da Esperanto-monumentoj ekzistas en la mondo.

Por tio pli bone taŭgas Vikidatumoj (WikiData). Fondita en la jaro 2012, ĝi estas kolekto da objektoj, simile al Vikipediaj artikoloj. Ĉiu objekto havas nomon Q sekvita de nombro.

Ekzemple la Zamenhofa monumento, Vieno havas la nomon Q38007732 kaj estas trovebla ĉe <https://www.wikidata.org/wiki/Q38007732>.

Tie estas listigitaj diversaj “atributoj”. Ekzemple la Zamenhof monumento “estas” (P31) “Zamenhof/Esperanto-objekto” (Q75762).

wikidata.org/wiki/Q38007732

Zamenhofa monumento, Vieno (Q38007732)

monumento en la centro de la urbo

► En pluraj lingvoj

Deklaroj

<u>estas</u> Property:P31	protektita monumento ► 1 referenco
	<u>Zamenhof/Esperanto-objekto</u> Q75762 ▼ 0 referencoj

bildo 1 Vikidatuma objekto

Kiom da aliaj Zamenhof/Esperanto-objektoj estas troveblaj? Por traserĉi Vikidatumojn, sufiĉas, malfermi <https://query.wikidata.org/> kaj entajpi kelkajn liniojn da teksto.

```

1 # Zamenhof-monumentoj
2 SELECT ?objekto ?objektoLabel ?landoLabel ?loko
3 WHERE
4 {
5     ?objekto wdt:P31 wd:Q75762;
6         #wdt:P625 ?loko;
7         wdt:P17 ?lando.
8     SERVICE wikibase:label { bd:serviceParam wikibase:language "eo" }
9 }

```

bildo 2 Linioj por demando

Jen la demanda teksto:

```

# Zamenhof-monumentoj
SELECT ?objekto ?objektoLabel ?landoLabel ?loko
WHERE
{
    ?objekto wdt:P31 wd:Q75762;
        #wdt:P625 ?loko;
        wdt:P17 ?lando.
    SERVICE wikibase:label { bd:serviceParam wikibase:language
        "eo" }
}


```

Enmomente (17-an de Aprilo 2021) ĝi redonas 124 rezultajn objektojn.

objekto	objektoLabel	landoLabel
wd:Q63253375	51-a Bazlernejo Ludoviko Zamenhof en Bjalistoko	Pollando
wd:Q56753941	Avenue Dr Zamenhof, Anderlecht	Belgio
wd:Q201017	Bona Espero	Brazilo
wd:Q3847076	Centro Ludoviko Zamenhof	Pollando
wd:Q45320097	Doutor Luiz Lázaro Zamenhof	Brazilo
wd:Q19016404	Dr Zamenhofstraat, Schiedam	Nederlando
...

Se ni ankaŭ volas scii la lokon, ni simple forigu la simbolon # antaŭ wdt:P625 ?loko;

La demando nun redonas nur 79 objektojn, kiuj entenas informojn pri la loko. Tiujn oni ankaŭ simple povas montri kiel mapo anstataŭ tabelforme.



bildo 3 rezulto kiel mapo

Ekzistas famaj Esperantistoj kiel ekzemple Kálmán Kalocsay (Q12628).

Via tasko:

Pri kiuj homoj scias Vikidatumoj, kies okupo (P106) estas Esperantistoj (Q860918)?

Kiuj el tiuj samtempe havis okupon (P106) poeto (Q49757)?

[1] <https://eo.wikipedia.org/wiki/Vikidatumoj> ... Vikidatumoj (Wikidata)

```
# Solvo:
# Esperantistaj poetoj
SELECT ?objekto ?objektoLabel
WHERE
{
  ?objekto wdt:P106 wd:Q860918; # Esperantisto
           wdt:P106 wd:Q49757.   # poeto
  SERVICE wikibase:label { bd:serviceParam wikibase:language
    "eo" }
}
```